

decembro 2011

Tiu nova numero de nia bulteno „Konstru-Forumo“ estas la unua farita de mi, Pierre Grollemund, (PG) nova kunordiganto,. Anstataŭi Jan Werner ne estas facila tasko ! Fakte, mi proponis mian helpon kaj neniu alia sin proponis, do jen nova tasko, ne nur help-cela, sed kunordiga !

Mi memorigas al vi kio estis dirita pri nia labor-metodo : La forumo traktas jen unuopajn nociojn kaj terminojn, jen etajn nociarojn. Tiu ĉi labormetodo plaĉas al mi. Ni malrapide progresas, sed ni ne progresu tro haste. Mi pensas, ke multaj kunlaborantoj apenaŭ povas trakti pli grandan aŭ rapidan laboron. Do, mi opinias, ke ni ne sukcesus labori pli rapide aŭ pli multe. Gravas ankaŭ dediĉi tempon al kompilado kaj publikigo de rezultoj. Ĉu en la JK 2010 estas planita resumo de la privediciditaj terminoj el KF? (*Fakte tio aperis en la Jar-Kolekto 2010 de la paĝo 66 ĝis la 99 !PG*)

De Pierre : mi kunsentas pri tiu sinteno kaj tial proponas al vi :

1. plu trakti la jam enŝovitajn temojn
2. iom postiole komenci novajn temojn laŭ propono de niaj membroj.
(vidu mian proponon ĉi-malsupre)

En la lastaj numeroj de Konstru-Forumo, mi observis, ke multaj punktoj restas netraktitaj. Mi tajpis liston de la jam traktitaj temoj, kadre de nia interŝanĝoj, por havi ian **supervidon** de la tuto. Bonvolu rigardi ĝin kaj skribi al mi **kiujn temojn vi taksas nepre sekvindaj**. Mi verdigis kiam mi pensis, ke la temo estas fermita post konsento ; kaj mi flavigis, se estas dubo, almenaŭ ĉe mi ! Bonvolu korekti se eblas al vi.

TERMINOJ ĉu akceptitaj ĉu plu debatotaj en KONSTRU-FORUMOJ

			En kiu N° de K-F
• N° 3	Kurt-solivo / kurta solivo	konsentita	KF 13 / 14/ 15
• N° 13	kipado knikado kipi, kipado (netransitiva verbo).		KF 13 / 14
• N° 14	bitumo asfalto	Konkludo KF19 : ne decidite ?	KF 13/14/15/16/18/19
• N° 15	debato spezo aŭ trafluo.	Konkludo KF19 : ne decidite ?	KF 16 /18/19/20
• N° 18	„Humgebindehaus“ =	?	
• N° 19			
• N° 20	ladisto / zinkisto / tubisto	konsentite sekvota kun aliaj meti-nomoj	KF 16
• N° 21	demoli malkonstrui		
• N° 22	tekto , planko, plafono	konsentita	KF 16
• N° 23	Vimbergo, aĵuraĵo	Fermite (ĉu ne decidite ?)	KF 15/16 /17 /18
• N° 24	Sanktusturo?	Fermite, sed ne decidite ??	KF 15 / 16 /17
• N° 25	stuko, puco.	Ŝajne konsentite	KF 15 / 29!
• N° 26	vicbalko konsentita	propono aldoni ene de temo ĉarpentista	KF 15 /16
• N° 27	lignajn tabulojn OSB.	lignerfaska tabulo. Konsentite	KF 15 / 16 / 17
• N 28	dukto & dukti.	Ŝajne konsentite	KF 15 / 18
• N° 29	etaĝo	konsento pri uzo de tiu termino inkluzive de la ter-etaĝo ?	
• N° 30	kanalizo, kanalizacio, kloako.	En Jar-Kolekto 2010	KF 16/17/

Strasburgo, Liono estas ja delonge la esperantaj vortoj por la koncernaj urboj, kiel Berlino, Pekino, Londono, NovJorko, ktp. Sed li komencis esperantigi nomojn kiajn « La Tour du Pin » al « Turipeno », « Tassin La Demi-lune » al « Tasiluno » ktp ! La novaj esperantaj vortoj estas ne rekoneblaj eĉ de la lokaj esperantistoj !

Ni prikonsideru tiun tendencon- kies ĉefa malavantaĝo estas malinternaciigi esperanton !- Do, se necesas krei novajn vortojn, supozeble ene de terminologia kohereco, ni ne forgesu, ke nia celo estas prezenti **utilajn kaj uzotajn** terminojn al kiel eble plej granda nombro da personoj. Mi rimarkas, ke en nia kolektivo ĉeestas nur eŭropanoj. Bedaŭrinde mankas, koreanoj, japanoj, ĉinoj kaj aliaj !


Rimarko PG (ege malagraba por mi !) Rerigardinte la lastajn KF-ojn, mi observas, 1 ke multajn temojn mi nek prizorgis nek legis (precipe Duden ks), 2 ke necesos al mi ege da tempo por ĉion relegi atente kaj provi kompreni, 3 ke kelkaj nocioj estas super mia komprenkapablo . (ekz balkoj ĉiaspecaj, bokoj, ks !), 4 ke tio ne ebligas al mi serioze partopreni viajn diskutojn !

Proponoj (PG) : Ĉu interesus vin reripensi terminojn pri ĉarpentado laŭ **alia metodo** ol la nura kribrado de Duden ? Mi memorigas al vi, ke en la numero « Jar-Kolekto 2006 » Jan Werner jam verkis artikolon pri la « Ĉarpentista interligado de lignoj . Aperas vortoj kiaj *fosto* ; *ĉevrono* ; *patno* ; *ŝtreboj* ; ktp . Kaj jam estiĝis multaj interŝanĝoj viaj pri ĉarpentado, okaze de la **Bildvortaro Duden 273** (Ĉarpentisto) – tio kio povas helpi la ne-ĉarpentistoj.

Nu, por ke ĉiu havu klaran opinion de la traktota objekto, mi enŝovos iom postiope desegnojn kun la diversaj terminoj, foje proponitaj. Estus bone kompari kun la nacilingvaj terminoj ; ni ankaŭ spertis, ke la konceptado kaj prilaborado de ĉarpentaĵoj ne estas la sama en ĉiuj landoj, eĉ se najbaraj, kiel estas Francio kaj Italio . Kaj ju pli da **desegnoj, fotoj**, despli da klareco por ĉiuj, inkluzive de ne-specialistoj. Mi antaŭe pardon-petas al niaj KF-membroj kaj legantoj : Neniel, mi intencas prezenti min kiel la specialiston en ĉarpentado. La temo interesas min – ĉu ankaŭ vin ?- kaj per tiuj desegnoj, mi proponas al vi metodon. Ni solvu unue la problemon de la terminoj por bazaj ĉarpentaj pecoj, antaŭ ol iri pli antaŭen. Je alia vid-punkto, ni traktu laŭ terminologia logiko la vortojn jam ekzistantajn en PIV, kiel ŝtrebo ekzemple, ĉar tie kuŝas multaj problemoj !

Komenca pripensado pri la diversaj pecoj de ĉarpento.

1) La plej simpla kaj antikva formo de ĉarpento : **triangulo**, kies flankojn konsistigas la ĉevronoj (kiuj portas la tegmenton pere de bretaro) .



La ĉevrono-piedoj emas distanciĝi pro la pezo de la tegmento. Por malebligi tion, oni fiksas horizontalan trabeton, kies celo estas ĝuste pluteni la triangulan formon, kaj precipe la distancon inter la du ĉevronoj..

Kompreneble la spano estas malgranda (maksimume 4 metroj)

Ĉu oni povas nomi « **girto** » tiun pecon N°2 ?

Persone, mi trovas, ke « girto » ne ŝajnas tre taŭga. Ĉi-tie, ĝi aspektas al mi kiel

« stego ». Vidu la difinojn de PIV ĉi-sube.

- 1 **Girto** Vidu Jar-Kolekton 2010 / paĝo 95 Tiu girto (N° 5 dufoje) en horizontala pozicio. utilas por firmigi kaj pluteni la spanon inter du mezaj fostoj, Ĉi-supre ne videblas fostoj .
- 2 **Stego** : (laŭ PIV) « Peco, kiu kunligas 2 flankojn de objekto,.. por plifortigi ilin, fiksi ilin en ne varia pozicio . »




- 3 **Ŝtrebo** : (laŭ PIV) sinonimo de Kontraŭapogilo : « helpilo konsistanta ordinare el klinita stango, por subteni kaj firmigi vertikalan foston. » Vidu foton : ŝtreboj subtenas la fostojn en vertikala pozicio antaŭ ilia kunligado.

Mi emus rezervi tiun terminon **ŝtrebo** al la ĉarpentaj pecoj, kiuj subtenas pecon ricevantan ŝarĝojn, krom la unua signifo de PIV , sinonimo de « kontraŭ-apogilo ».

Dume, **stego** estu rezervata al la pecoj kiuj firmigas la triangulan formon de truso.

Bedaŭrinde, tiuj 2 terminoj iel similas , kio povas facile krei konfuzojn !



Jen 5 desegnoj de tio kion mi komprenas pri la termino « **stego** » kies funkcio estas kunligi, por fiksi en nevaria pozicio. Komprenble, la stego pro sia funkcio-mem « precipe kontraŭstaras la fortojn kiuj misformus la objekton » (PIV 2002)

Via opinio : ĉu vi konsentas aŭ ne, ke oni taksu **stegoj** la elementojn apude desegnitajn ?


Rim : mi skribis erare *ŝtupetaro* anstataŭ *Ŝtupareto*. Bonvolu korekti !

Jen nun, plia desegno, kun 2 ekzemploj de **ŝtreboj**.


La koncepto pri ŝtrebo por nia fako estu nepre pli larĝa ol la simpla „kontraŭ-apogilo“. Sammetode, bonvolu diri, ĉu vi taksas ŝtreboj tiujn 3 objektojn :

- Ŝtrebo de dratreto paliseto
- Ŝtrebo ĉe grunda de fosto (kiel ĉe la supra foto)
- Ŝtrebo „malgrunda“ (tiun vorton nur hodiaŭ por precizigi kiun pecon de l' desegno !)

Mi konscias, ke ĉi-tiu lasta ŝtrebo ankaŭ estas stego ! Ĉu ni forlasu unu el la 2 vortoj ?



Mia opinie, la ĉefa diferenco inter la 2 terminoj, **stego** kaj **ŝtrebo**, kuŝas tie : stego celas fiksi, dum ŝtrebo precipe utilas por kontraŭi fortojn. Se vi konsentus pri tio (vi ne estas devigataj !), ni havus kriterion port trafe uzi tiujn 2 terminojn, ege utilajn en la fako ĉarpentado !



2) Kaj nun denove al ĉarpentado !

La tradicia –en multaj landoj- triangulo de ĉarpenta truso.

Ties pecoj ekvilibrigas la diversajn fortojn (premo, tiro, flekso, kaj similaj)

Sur la apuda desegno, intence, mi desegnis nek patnojn, nek ĉevronojn, ktp. Sed mi tajpis la streketojn (ne nepre necesajn poste !)

inter la radikoj de la kunmetitaj vortoj.

Nu, kiel nomi tiujn pecojn ?

Kelkaj terminoj estas jam pli malpli konataj.

- A Pendo-fosto
- B Tir-trabo aŭ bindo-trabo

A Fosto aŭ **pendo-fosto** : ĝi eltenas tir-fortojn supren kaj malsupren el la pecoj C kaj D.

Ĝia funkcio estas plura : fortikigi la ligan inter la 2 oblikvaj pecoj C ; ricevi la ŝarĝon de la tegmento-pezo trans la peco D ; subteni la pecon B kiu emas fleksiĝi malsupren pro la propra pezo.

B Tir-trabo aŭ **bindo-trabo** : ĝi eltenas la tirfortojn kiuj devenas el la bazo de ambaŭ pecoj N° 3.

Tiu tirtrabo povas ankaŭ fleksiĝi malsupren pro la propra pezo. Pro tio, ĝi estas ofte ligita al la pendofosto, ĉu per mortezo, tenono kaj keĵlo, ĉu per ŝeklo. Ĉar tiu trabo estas ligita al la pendofosto kaj al la pecoj C - kio fermas la bazan triangulon - ĝi povas esti nomata « bindo-trabo ».

C Stego aŭ **Ŝtrebo** aŭ **alia termino** ? Mia opinie, nepre necesas speciala termino pro tiu peco, kies funkcio estas fundamenta en ĉarpentado. Stego kaj ŝtrebo ne konvenas. Antaŭ ol decidi, mi petas de vi , ke vi serĉu la ekvivalenton en naciaj vortaroj aŭ enciklopedioj. Vidu la postan tabulon.


4 Stego aŭ **Ŝtrebo** ? Tiun pecon, ni povus taksi “ŝtrebon”, ĉar ĝia funkcio estas simila al “ kontraŭ-apogilo” (Vidu PIV je la vorto “apogi”) Ĝi subtenas la pecon C kontraŭ la flekso-fortojn de la tegmento-pezo

Tial, nepre necesas trovi terminon por la pecoj C !

3) Nun, observu la 4an desegnon, el la libreto de Gilbert LEDON “Konstruu vian domon”

Instruigaj eraroj !

Jen rapida trarigardo pri ĉarpento ! (la aŭtoro ne celis pli !) Kiuj terminoj estas taŭgaj ?



- 3 Fosto (malpreciza)
- 5 randa patno (preferindas baza patno aŭ mur-patno)
- 6 Patno (tie-ĉi meza patno)
- 8 Ĉevrono
- 9 Ŝeklo
- 12 Lato
- 13 Tegolo

Neniu stegoj !

Krome, eble ekzemplo-cele, la alteco de la ĉarpento estas kalkultota tiel : $H > \text{spano}/4$!

Kiuj estas la observeblaj eraroj ?

- 1 « Suba membro » ne akceptebla, ĉar tro svaga!
- 2 « Diagonalo » Same svaga. Tiun terminon ni eble uzos, sed pri tute alia peco.
- 4 « Supra membro » same ne akceptebla.
- 7 « Firsto » Fakte temas pri la « firsta patno » (patno kiu situas ĉe la firsto)
- 10 « Ŝtrebo » Neniel komprenebla sur tiu desegno. Almenaŭ la vorto estas konata !

Mia demando : kion vi pensas pri tiuj terminoj „stego“ kaj „ŝtrebo“ ?

Ni referencu al la desegno de la tradicia ĉarpento (kun ties simpla triangulo) por la sekva tabulo :

	Esperante	France	Germane	Angle	Ĉeĥe	Hungare	Nederlande	Kroate ktp
peco A	Pendofosto	Poinçon						
peco B	Tirtrabo	Entrait						
peco C	?	Arbalétrier						
peco D	Ŝtrebo ?	Contrefiche						

Ni solvas termin-vakaĵojn

La temo 38 – traverso, longverso : ĉu estas konsento inter ni pri tiuj du terminoj ? Mia opinie, jes.

La temo 41 – Segitaj lignopecoj. J. Horváth Mi ne havas kontentigan super-rigardon. Eble, ankaŭ vi ne. Ĉu S-ro Horvath povus proponi sintezan tabelon, kun dimensioj aŭ proporcio ? Planĉo, tabulo, breto, lato kaj similaj ! Uf,

La temo 45 – Balkosubtenaj konstruktoj Pierre : antaŭ ol diskuti pri proponitaj terminoj, kiaj “pendobalko”, “ŝtrebobalko” kaj aliaj, mi dezirus, ke ni precizigu la nociojn de “ŝtrebo” kaj aliaj. Al Jan W, mi aldonas : ĉu eblas al vi aldoni bildojn pri “simpla balko” kun ties du 2 **artikaj** subteniloj, unu el ili **firma**, la dua **ŝovebla**? Via priskribo en la paĝo 72 de la Jar-Kolekto 2010 estas malfacile de mi komprenebla, precipe pri la ĉi-supre itale skribitaj vortoj. Mankas desegnoj aŭ ekzemploj. Ĉu “balko” estas sinonimo de “trabo” ? Tute male, la **desegno** iam sendita pri lukarna ĉarpento kun ties supra kaj suba **vicbalkoj** estis tre klaraj. Dankon pro ĝi !

La temo 48 – bindoro Mi petas la partoprenantojn de KF iom prokrasti antaŭ ol decidi pri tiu termino. Ĉu ne indas antaŭe distingi « bindo-trabo-n » kaj « bindoro-n » ? Mi aldonas, kun pardonpeto, ke en la franca, *ferme principale*(ĉefa truso) kaj *entrait* (tirtrabo) tute ne estas sinonimaj. Vidu ĉi-supre.

La temo 49 – castellated beam → **krenela balko**. _Bonvolu ne konsideri min idioto, sed mi ne komprenas al kiu nocio korespondas tiu objekto. La desegno estas tute malklara ! Ne ĝenas min la termino « krenela balko » Ĝenas min la malklareco. Ĉu vi ne intencas esti komprenataj ANKAŬ de ne-specialistoj ?

La temo 50 – EBV Duden 275 Tiu temo ege interesas min, sed por ne atendi al vi la N° 32 de KF, mi ne komentos hodiaŭ. Prefere mi prenu tempon por detale legi kaj analizi .

La temo 51 – ŝtonceramiko

La temo 52 - tektonika arĥitekturo

Rimarko de PG pri : « **pikardia** rilatas al **Pikardio** » jes ja, temas pri regiono norde de Francio. Tie la kamparanoj plu parolas nun francaspektan dialekton – neniel keltaspektan-. En tiu dialekto*, dum la mezepoko, estis skribitaj ĉefverkoj, kia “Le Chevalier de la Charrette » de Chrétien de Troyes. [La Kavaliro de la Ĉaro]. Poste, la francilia (pariza) dialekto sin imponis kiel la oficiala lingvo, pro evidentaj kaŭzoj, politikaj kaj ekonomiaj : la franca lingvo !

* Ekz de pikardia dialekto : esp : « rigardu la hundon kaj la ĉevalon » ; france « regarde le chien et le cheval » ; pikarde « erbe eŝ kien e eŝ kval » (fonetike skribita !)